

## Usona Esperantisto № 2019:6 (nov-dec)

### Anoncoj

Help ESF preserve the past; Nova albumo de Vinilkosmo; Speciala numero de *La Riverego*; Two-day Esperanto course before UK; Volas korespondi; Printempa Esperanto-Renkontiĝo 2020

### Voluntule

**de la prezidanto** • Filipo DORCAS

La plej nova rondo de volontuloj estas la regionaj kunordigantoj, grupo de dek, kiuj laboras kune por helpi la lokajn grupojn en siaj regionoj.

### Omaĝe al William R. HARMON

**omaĝoj** • Orlando E. RAOLA

Forpasis nia kara Vilĉjo la 27-an de Novembro, 2019.

### Traduki “inverse”

**traduku!** • Hoss FIROOZANIA

Ĉu vi kuraĝas enangligi la jenan tekston de Marjorie BOULTON?

### La vivo de Peĉjo

**ŝercoj** • Timothy BORONCZYK

La sesa en serio de bildstrioj danke al Timoteo BORONCZYK.

### Zamenhof dubis, ĉu li iros al UK en 1910

**el la arĥivo** • L. L. ZAMENHOF

Ĉu vi ankoraŭ ne decidis, ĉu vi partoprenos en la venonta UK en Nordameriko? En 1908, ankaŭ LLZ dubis, ĉu li partoprenos en nordamerika UK. Sed malgraŭ la enormaj defioj tiutempe, li venis!

### Kverela kalemburo

**ŝercoj** • Benson SMITH

Adamo volis respondi al la insulto de Eva, sed ...

### Salutis

**senintenca esperantaĵo** • Margo COHEN

La minerala akvo salutis ĉe la buŝo, kaj adiaŭos aliloke ...

### Festu Novjaron

**beletre** • Leonid TURKADZE

Novjaraj bondeziroj, verse.



# Anoncoj

## Help Preserve the Past

Seismic shifts in the way we communicate mean that printed books and paper records are getting lost as Esperantists turn away from them, or previous generations of Esperantists die, leaving behind their libraries, their correspondence, the minutes and membership lists of local clubs, and paraphernalia.



The Esperantic Studies Foundation has launched a campaign to preserve and conserve this material. We are trying to track down unwanted collections of Esperanto books, periodicals, paper correspondence, and records of local Esperanto clubs past and present. We are accumulating this material and passing it on to institutions that can preserve it and make it available to scholars. We are equally interested in the records of other organizations or individuals concerned with other projects for international languages or fictional languages.

If you know of material languishing in private hands—or indeed unknown to the public but in public hands—please get in touch with ESF. We will be glad to help preserve it, or get the word out about its availability to scholars and researchers.

For more information, see **this article at the ESF website** <<https://bit.ly/2sGDuVi>>, or contact [admin@esperantic.org](mailto:admin@esperantic.org).

— Chuck MAYS

## Nova bita albumo de Vinilkosmo

La muzikeldonejo Vinilkosmo ĵus eldonis novan bitalbumon *Nenifar'* de Gijom' ARMIDE.

Ĝi estas la unua albumo de Vinilkosmo aperinta sub la libera permesilo **CC BY 2.0 de Krea Komunaĵo** <<https://bit.ly/2tqZCTu>>.



Armide prezentis sian unuan koncerton en Esperantujo en 2009 dum la renkontiĝo FESTO en Germanujo. Tio estis la komenco de longa serio de koncertoj danke al la notindaj subtenoj de EUROKKA kaj Vinilkosmo, Varsovia Vento, IJF (Itala Esperantista Junularo), kaj aliaj.

*Nenifar'* prezentas sociajn temojn kiel feminismon (“La plej granda”), pluramon (“Amu rin”), nudemon (“Nuda”) kaj temojn pli personajn kiel sopiron al forestanto (“Mankas vi”), amrilatojn (“Amo kaj Asfalto”, “La postrompiĝa temp’”, “Eĉ se ne amen” ...) kaj la teruran senton kiam malaperas la belegaj harbukloj de amiko (“Viaj bukloj”).

Por pli da informo, vidu **la albumpaĝon ĉe Vinilkosmo** <<https://bit.ly/2ZL2mHo>>.

## Mikroeldono de *La Riverego* pri UK

*La Riverego* estas la revuo de Esperanto-Societo Kebekia (ESK). Redaktoro Ĵenja AMIS eldonis specialan numeron por informi kaj reklami pri la venonta UK en Montrealo. **Jen la numero, elŝutebla en PDF-formo** <<https://bit.ly/37L7myF>>.



En 2020 la 105-a Universala Kongreso venos al Montrealo, Kebekio, de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto. Estas ege malofte, ke UK okazas en Nordameriko, kaj neniam antaŭe ĝi okazis en orienta Kanado. Nepre ne maltrafu tiun ĉi oportunon partopreni en la plej granda internacia Esperanto-evento de la jaro. Eblas **aliĝi rete ĉe la retejo de UEA** <<https://uea.org/kongresoj/alighilo>>.

## Special two-day course in preparation for UK

Prepare yourself to take part in a friendly, enthusiastic, and international community of Esperantists with this brief course!

In preparation for the upcoming World Esperanto

Congress in Montreal, experienced Esperanto instructors Katalin Kovats and Sylvain Lelarge will offer a two-day course beginning on Friday, July 31st and ending on Saturday, August 1st.



This is an excellent opportunity for anyone with minimal experience in Esperanto to dive into the exciting and immersive environment of the World Esperanto Congress with the aid of effective instructors.

With a newly acquired knowledge of Esperanto, you will converse with fellow Esperantists, make friends, share stories, and build new memories as you interact with a diverse crowd of international visitors.

The cost of instruction will be 75 US dollars and will be immediately followed by the first day of the World Esperanto Congress on Sunday, August 2nd.

For further information regarding this course please visit the **Esperantic Studies Foundation's course page** <[https://www.esperantic.org/en/montrealo\\_2020/](https://www.esperantic.org/en/montrealo_2020/)>.

## Korespondi deziras

Mia nomo estas Marea. Mi estas usonanino kaj mi eklernas Esperanton. Mi serĉas korespondadan amikinin. Bonvolu skribi al mi. Dankon.

**bfriedman@keio.edu**



## Printempa Esperanto-Renkontiĝo 2020



Enjoy a special time in a special place with special people on the last weekend in April 2020. PER takes place in the lovely mountains of North Carolina outside of Banner Elk at the Valle Crucis Conference Center.

Starting on April 24, 2020 and running through noon on the April 26, is this year's *Printempa Esperanto-Renkontiĝo*. Thomas Alexander will be our instructor-in-residence and activities coordinator. Like last year, PER will be a totally immersive Esperanto experience crafted towards sharpening language skills (comprehension, diction, vocabulary) and having fun doing so.

Activities will include:

- Fundamentals of pronunciation,
- Music and Singing,
- Reading aloud (prose, poetry),
- Board games,
- Outdoor activities: Walking, Treasure hunting, Visiting local attractions.

The *Printempa Esperanto-Renkontiĝo* will be excellent preparation for both the upcoming 105th World Esperanto Congress in Montreal and NASK in Raleigh, NC. But whether or not you are planning to attend these events, we hope you will join us. The cost is \$225 for two nights of lodging, all meals, and the full program; \$200 if you sign up before March 31, 2020. Registration forms and further registration information are available at **our website**

<<http://esperanto-nc.org>>.

— Tim GEE

# Voluntule

de la prezidanto • Filipino DORCAS

Unu el miaj plej ŝatataj citaĵoj de televida programo estas de *Star Trek, The Next Generation*. Picard klopodas danki al Worf pro fari taskon bone, sed Worf ŝirmas la dankon kaj respondas, “La honoro estas servi.” Kia tributo fari laboron bone por la celo mem kaj ne por publika danko aŭ por materiala kompenso.



La honoro estas servi.

Volontulemo estas esprimo de homaj rilatoj kaj dediĉo al servo en tiuj rilatoj. La volontulo servas en grupo kie komunaj celoj kaj interesoj havas altan valoron. La kernaj valoroj estas altestimataj.

La estraro de Esperanto-USA pripensas ĉiumonate ĉi tiujn celojn:

Esperanto-USA estas senprofitcela organizo kiu instigas kaj plifortigas la Esperanto-komunumon en Usono kaj ĝiaj teritorioj faciligante subtenon kaj komunikadon por lokaj grupoj kaj provizas centran aron de helprimedoj por niaj membroj.

La Estraro agas voluntule, kaj laboras rilate al aliaj komitatoj kaj volontuloj. Volontulado servas al Esperanto-USA por strebi kaj paŝegi direkte al celoj por pli bona mondo. Ekzistas fiero ne en

materialisma senco, sed en vera valoro de tio, kio estas bona en la vivo.

La Esperanto-movado en Usono utilas per multaj volontuloj, ne nur en Esperanto-USA, sed ankaŭ en AAIE, ESF, USEJ kaj multaj lokaj grupoj.

La plej nova rondo de volontuloj estas la regionaj kunordigantoj, grupo de dek volontuloj, kiuj laboras kune por helpi la lokajn grupojn en siaj regionoj. Ĉi tiuj volontuloj kunvenas kaj dediĉas sin al kreskado de la movado en iliaj regionoj. Gvidantoj en via loka grupo probable jam komuniĝis kun unu el ĉi tiuj dediĉitaj servantoj. Ni ĉapel-dankas al ĉi tiuj novaj volontuloj kun tutkora danko!

Kiel vi volas volontuli por Esperanto-USA? Kiel vi servas en via loka grupo? Kio estas via vizio pri projektoj, kiuj helpas vian grupon, vian regionon aŭ al Esperanto-USA? Kie vi sentas la alvokon servi? Sciigu vian regionan kunordiganton!



**Filipo DORCAS**

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

[filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org)



# Omaĝe al William R. HARMON

Forpasis la doĵeno de la usonaj Esperanto-aktivuloj (1927-2019)

omaĝoj • Orlando E. RAOLA



Desegnaĵo de Vilĉjo, farita de amiko en Azio.

Mallonga sciigo pere de Fejsbuko komunikis al ni la vivofinon de Vilĉjo HARMON, la tagon antaŭ la usona Dankofesto. La forpaso de homo ĉiam invitas al retrorigardo, kiu donas la nuran mildigon al la amara malĝojo venigita de morto: kion la homo postlasas, kion li heredigis al la homaro, kiel li estos memorataj de la postvivantoj. En la kazo de s-ro Harmon estas vere granda kaj signifa postlasaĵo, aparte por la esperantistoj de tiu ĉi lando-kontinento.

Li lernis Esperanton kiel adoleskanto. Temis pri dimanĉa lernejo, kie feliĉe la instruisto ne nur instruis pri religio sed ankaŭ pri Esperanto. Vilĉjo vivis en la esperantlingva medio ĝis siaj lastaj tagoj, entute iom pli ol okdek jaroj. Do, kiam mi konatiĝis kun li okaze de la 75-a Universala Kongreso en Havano, 1990, li jam estis movada figuro kaj plenrajte veterano.

Senlaca homo, kapabla kaj afabla, ankaŭ tre direkta kaj senartifika, preta aŭskulti kaj rezoni, sed ankaŭ preta sinesprimi kun tiom da forto kaj pasio, ke fojfoje homoj iom timetis argumenti kun li. Sed entute liaj pasioj kaj zorgoj estis ĉiam je la flanko antaŭenigi la aferon Esperanto, ambaŭ per diskonigado al eksteruloj kaj per kunĝuado de la

unika etoso kreita ĉiam kiam aro da samlingvanoj renkontiĝas.

Mi ne volas ripeti en tiu ĉi noto aferojn kiujn ĉiuj konas aŭ povas trovi facile per guglado de lia nomo. Male, jen mi volas honorigi lian memoron per kundivido de miaj personaj spertoj proksime de William Harmon. Estas tute klare, ke plejmulto de la legantoj de *Usona Esperantisto* povus verki similan noton, ĉar ni ĉiuj iel aŭ alie rilatis kun kaj sentis la influon de lia elstara personeco.



Vilĉjo kaj Lusi Harmon.

Du jaroj post niaj interkonatiĝo en Havano, mi veturis al San-Francisko por partopreni la someran kursaron de 1992. Alveninte, atendis min ĉe la pordo de la aviadilo Ĉarli GALVIN, mia gastiganto, kaj Vilĉjo, kiu provizis la transportadon. Li estis ege lerta ŝoforo. Mi la unuan fojon veturis en aŭtoŝoseo en lia aŭto. Ni amike babilis, sed mi estis tute terurigita, ĉar laŭ mia sento, ni veturis fulmrapide kaj mi simple ne komprenis, kiel li povis stiri kaj daŭre interŝanĝi kun ni. Ni adiaŭis, kiam ni alvenis unuopece ĉe la pordo de Ĉarli.

Posta renkontiĝo okazis en la tradicia pikniko kiu markis sukcesan finon de la kursaro; ĝi estis ĉiam

organizita ĉe gesinjoroj Harmon, kiuj tiam loĝis en El Cerrito. Post la pikniko mi restis en ilia hejmo por partopreni la landan kongreson, do temis pri mia dua sperto pri gastado ĉe eksterlandanoj. Mi aŭdis de ili ŝercojn pri multaj aliaj gastoj kiuj antaŭ mia vizito restadis en ilia gasteĉambro, ja gastamo estis trajto, kiu ankaŭ briligis nian bedaŭratan amikon. Jarojn poste, kiam mi denove translokiĝis al la Golfa regiono, Vilĉjo kaj Lusi loĝigis nin tutan semajnon, dum ni trovis loĝejon.

Kiel homo kiu atingis multon dumvive pere de sia propra laboro kaj sindediĉo, li ne vere havis multan paciencon por almozetantoj. Dum veturo al trajna stacidomo, mi lernis tiun trajton de lia karaktero, kiam li tute senĝene diris al almozulo "Iru perlabori vian panon". Ne, ne temis pri avarulo, tute male. Mi ankaŭ havis la okazon, kelkajn jarojn poste transdoni de liaj manoj al la manoj de la asocia oficisto ĉekon por dek mil usonaj dolaroj per kiuj li kontribuis al la fina realigo de la projekto *Pasporto al la tuta mondo*. Kaj poste, tra multaj jaroj, mi ankaŭ regule ricevis liajn ĉekojn per kiuj li subtenis samideanon kaj amikon en mia denaska lando, al kiu li mem ne povis rekte sendi helpon. Do, mi senpere konis lian malavarecon kaj helpemon.

Dum liaj jaroj kiel sukcesa komercisto en ŝipkompanio, Vilĉjo kaj Lusi havis la okazon loĝi en Japanujo, kaj estis surprize kaj agrable vidi, kiom multe la plurjarmila kulturo de tiu lando influis ilian vivon post tiu vojaĝo. Niaj japanaj samideanoj bone povas atesti pri lia amikemo kaj bonvolo al ili. Inter multaj aliaj aferoj, mi ŝatus rimarkigi la fakton, ke iam aperis antaŭ ili la ebleco aĉeti domon kiu estis konstruita laŭ tre japaneca stilo, kaj kiu krome havis belegan japanan ĝardenon. Senhezite li translokiĝis al tiu belega loĝloko en la montetoj de Oakland, Kalifornio. Dum multaj jaroj, la esperantistoj kiuj loĝas en tiu ĉi regiono kaj multaj eksterregionaj kaj eksterlandaj vizitantoj pilgrimis al tiu domo de gesinjoroj Harmon por ĝui la etoson, amike babili, familiece kunmanĝi.

Usona  
**Esperantisto**  
Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2013:4 (jul-aŭg)

ISSN: 1056-0297

**Esperantist**  
American  
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2013:4 (jul-aŭg)



**Ĉi-numere:**

- De la prezidanto: Antaŭen kun novaj strategioj!
- Raportoj pri la Landa Kongreso kaj NASK
- Solvo de la "trinkajo-truko"
- ...kaj multe pli!

**La Landa Kongreso omaĝas al Vilĉjo HARMON pro lia senlaca laboro por Esperanto en Usono kaj tutmonde**

Kovrilo de *UE* № 2013:4, kun Vilĉjo kaj medalo.

Kirliĝas en mia memoro tiom da aliaj okazaĵoj de niaj komunaj travivaĵoj en Esperantio: en la Universala Kongreso en Fortalezo, li estis tre dankema al mi ĉar mi sukcesis gvidi lin en nekonata urbo al loko kie li povis manĝi bongustajn lokajn specialaĵojn ... kiom multe mi ĝuis lian kondutadon de aŭkcioj en niaj ĉiujaraj kongresoj kaj eĉ regionaj renkontiĝoj ... lia frustrigo kaj tamen lia kapablo resti respektema kaj afabla kiam esperantistino jam multe maljuniĝinta subite montriĝis ofendita per vortoj liaj kiuj tute ne emis ŝin ofendi ...

Okaze de la Kongreso en Raleigh en 2013, kiam lia sano malpliboniĝis ĝis tiu grado, ke lia plua partopreno en vojaĝado kaj Esperanto-renkontiĝoj montriĝis neverŝajna, Esperanto-USA decidis honorigi lin dumkongrese. Ni kreis por li medalon, sur kiu estis gravuritaj vortoj, kiujn li trovis plaĉaj, kaj kiuj krome, estis kvazaŭ devizo de lia vivo dediĉita al disvastigo de la Internacia Lingvo kaj de la monda paco. Sur unu flanko de lia medalo legeblas la zamenhofa verso: "L' espero, l' obstino kaj la pacienco ..."

Inter la multaj aferoj kiujn mi persone lernis de Vilĉjo Harmon troviĝas mia konatiĝo kun la asocio Toastmasters International, kaj la fakto ke li mem ĝuis tosti, kion ni ofte faris en la okazoj kiam ni kune manĝis kaj festis, aparte dum nia ĉiujara Zamenhofa Bankedo. Ĉi-jare, ĉe la bankedo ĉi-regiona mankos al ni William Harmon ĉe la tablo. Kio ne malpermesos al ni levi niajn pokalojn kaj tosti je homo kiu vivis

intense kaj interesplene, kiu donis sin en plena animo al la nobla kaŭzo de Esperanto kaj de frata amikeco inter ĉiuj homoj de la planedo: “Je via vivo, amiko Harmon!”

---

Por pli da informo pri nia kara Vilĉjo, bonvolu vidi ankaŭ la artikolojn “Honore al William Harmon” (2013:4) kaj “An interview with William R. Harmon” (2013:5).

---

## Zamenhof dubis, ĉu li iros al UK en 1910


el la arĥivo • L. L. ZAMENHOF

En 1908, EANA sendis leteron al d-ro L. L. Zamenhof, invitante lin al la unua nordamerika UK (kiu estis okazonta en Vaŝingtono en 1910). Zamenhof dubis, ĉu li povos veni. Li estis tiam malsana kaj malriĉa, kaj longa vojaĝo for de lia medicina praktiko estus por li tre malfacila. Sube aperas lia respondo, unue eldonita en la decembra numero de *Amerika Esperantisto* en 1908.

Kiel ni scias, malgraŭ la grandaj defioj d-ro Zamenhof ja vojaĝis al Nordameriko, kie li ĉeestis la UK-on en Vaŝingtono kaj poste eĉ vizitis Montrealon – la urbon, kiu gastigos la ĉi-jaran Universalan Kongreson, 110 jarojn poste. Ĉu ankaŭ vi venos al Montrealo? Kial ne? Imagu, malkiel d-ro Zamenhof, vi eĉ ne devos atendi pli ol semajnon surŝipe por atingi ĝin!

Varsovio, Dzika No. 9, 20-X-1908

Al Sro. Edwin C. Reed,  
Sekretario de la *Esperanto Association of North America*.



*Kara Sinjoro:*

Mi ricevis vian leteron de 20-IX. Al niaj Amerikaj samideanoj vi povas sciigi ke mi promesis al Sroj. Forman kaj Privat ke mi penos veni al la Esperantista kongreso en Ameriko kaj mi certe faros ĉion, kion mi povos, por plenumi mian promeson. Sed diri jam nun kun plena certeco ĉu mi povos veni nun estas ankoraŭ ne eble, ĉar la afero dependas de kelkaj cirkonstancoj, kiujn mi nun ne povas ankoraŭ antaŭvidi.

Antaŭ ĉio ĝi dependas de la stato de mia sano. En la nuna tempo ĝi bedaŭrinde ne estas tre bona; mi tamen esperas, ke ĝis la somero ĝi denove resaniĝos kaj mi povos entrepreni la grandan vojaĝon.

Grandaj vojaĝoj kaj longa restado for de mia hejmo estas por mi afero *tre malfacila*, ĉar tio ne sole estas ligita por mi kun grandaj elspezoj, kiuj por mi estas sufiĉe senteblaj, sed ĝi devigas min por kelka tempo *forĵeti mian medicinan praktikon* (t.e. la fonton de miaj enspezoj) kaj – kio estas la plej grava – ju pli longe mi restas for de mia hejmo, des pli ruiniĝas mia medicina praktiko, ankaŭ por poste. La Amerika Kongreso postulus de mi ne sole pli grandajn elspezojn ol la aliaj kongresoj, sed ankaŭ pli longan restadon for de la hejmo. Vi sekve povas kompreni, ke mi, ne estante riĉulo, povas entrepreni la Amerikan vojaĝon nur en tia okazo, se montriĝos, ke mia veno Amerikon estas efektive *tre grava por nia afero*.

Tial mi devas atendi kelkan tempon ĝis mi sciigos pri la karaktero, kiun la Amerika kongreso esperas havi. Kiam la Konstanta Komitato de la Kongresoj (kies prezidanto estas generalo Sebert) sciigos min, ke via kongreso estas preparita bone kaj ke ni povas atendi de ĝi grandan sukceson por nia afero, tiam mi uzos ĉiujn miajn fortojn por nepre veni al la kongreso.

Via,  
—Zamenhof

# Traduki “inverse”

traduku! • HOSS FIROOZANIA

---

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. Leginte viajn respondojn, ni faros resumon de la diversaj provoj, kune kun reagoj kaj komentoj.

---

**P**arolante pri tradukado kaj Esperanto, oni kutime pensas pri verkoj tradukitaj *el* la naciaj lingvoj. Enesperantigo de fremda literaturo historie estis (kaj daŭre restas) utila maniero evoluigi kaj riĉigi nian lingvon.

Tamen Esperantujo jam delonge ekhavis sian propran, originalan literaturon. Ĉu ne indas traduki ankaŭ originalajn Esperanto-verkojn “inverse” – tio estas, *el* Esperanto *en* la naciajn lingvojn?

Nepras mencii ĉi tie la bonegan libron ***Star in a Night Sky*** <<https://amazon.com/dp/190342772X>>, antologio de enangligita Esperanto-literaturo, redaktita de la brila Paul GUBBINS. La temon de inversa tradukado ankaŭ tuŝis la fama skota poeto kaj tradukisto William AULD en sia libro ***Pajleroj kaj ŝtopoj*** <<https://bit.ly/35AE3NI>> (p. 95):

[Inversa tradukado] estas tre grava kaj ankoraŭ ne sufiĉe uzita metodo por disvastigi bonan reputacion de nia lingvo inter la neesperantista publiko. Kompreneble ne temas sole pri poemtradukoj. [...] Bonaj tradukoj de bonaj (de sia speco) Esperantaj verkoj tre favore impresus la legantojn, kaj inklina ilin al simpatia sinteno al nia lingvo. La etikedo “Tradukita el Esperanto” fariĝu tiel impona kaj dece akceptata kiel “Tradukita el la angla” aŭ la franca aŭ la rusa aŭ iu ajn nacilingvo!

Ĉiu samideano povas kunlabori en tiu afero. Popularaj verkoj, noveloj, kleraj tezoj, poemoj – ĉio (kondiĉe ke ĝi estas bona verko bone tradukita) – povas trafi sian publikon kaj aldoni sian eron al la respekto al nia lingvo.

Ĉu vi ne volas iam provi tion?

Nu, kial ne?

Pasintnumere ni proponis por vi anglalingvan tekston

por traduki en Esperanton. Pri tio ni ne forgesis; la rezultojn ni raportos en la venonta numero.

Intertempe, jen teksto en Esperanto por traduki en la anglan, se vi kuraĝas. Ĝi venas el la novelo “Okuloj” de Marjorie BOULTON:

Leo ankoraŭ paŝadis en sia ateliero. Jam pli ol centfoje li provis eklabori; sed io detenis lian manon, ia sufoka premado malkuraĝigis lin. Li havis bonajn penikojn, ankaŭ provizon de diversspecaj kraĵoj por skizado; la lumo en la ateliero estis tute bona; multaj junaj artistoj, baraktante kontraŭ indiferenteco, devigite elekti inter nervmuela, temporaba pangajna laboro kaj multjara malsatado eble vivdetrua, certe enivis lin. Tion li mem sciis. Kvindekdujara, li nun havis komfortan domon, bonkvalitajn ilojn, eĉ kreditan saldon ĉe la banko. Pentraĵoj liaj jam troviĝis en multaj muzeoj en diversaj landoj. Oni jam verkis kelkajn librojn pri li.

Sed, tiun tagon, Leo paŝadis, penis devigi sin al laboro, reaŭdis kruelajn vortojn, kaj denove turnis la dorson al la laboriloj. Li penadis konvinki sin denove, ke la malaprobo de kelkspecaj homoj, iliaj ofendaj vortoj, estas atestaĵoj preskaŭ matematike validaj pri la supereco de la mallaŭdito. Sed la vortoj de malamikoj sonadis kaj resonadis en lia kapo. Kun escepte forta kapablo mense bildigi pasintajn kaj fantaziajn aferojn, li revidadis la maldiklipajn, mortokulajn negativajn vizaĝojn de tiu paro en la artgalerio. Li revidadis tiun ombrelopinton, kiu kun ŝira bruo vundis lian nudan belulinon *Ekscitino* kun ŝiaj en kvadratojn kristaliĝintaj mamoj. Tiu epizodo de enkarnigita kontraŭvivemo malebligis al li labori, preskaŭ malebligis al li pensi kohera.

Ni raportos pri viaj proponoj en la postsekva numero, 2020:2!

---

La redakcio (trovu la adreson en la kolofono) akceptos vian tradukon **ĝis la 15-a de Marto**. Bonvolu sendi **nur unu** version, ne plurajn diversajn provojn. Dankon, kaj bonan tradukadon!

---



# Salutis

senintenca esperantaĵo • Margo COHEN



Jen akvobotelo, fotita en Lisbono fare de nia kara Margo. Iom enigma estas la is-finaĵo: ĉu la akvo ne plu estas salutema? Eble nun, jam englutite, ĝi planas baldaŭ adiaŭi.

# La vivo de Peĉjo

ĉercoj • Timothy BORONCZYK



# Kverela kalemburo

ĉercoj • Benson SMITH



# Festu Novjaron

beletre • Leonid TURKADZE

Multan dankon al Leo TURKADZE, kiu lastatempe sendis al la redakcio plurajn el siaj diverstemaj kaj tre amuzaj poeziaĵoj; jen unu, tre pria por aperigi ĉe la komenco de 2020. Ni eble aperigos aliajn en venontaj numeroj.

Du mil dudeka alvenanta  
Nin estas strange surprizanta.

Jam multajn milojn da Novjaroj  
Ni post Decembro ĉiam festas  
Kaj ne supozas, ke eraroj  
En la surteraj kalendaroj,  
Nin konfuzante, trompĉeestas.

Por esti iom pli konciza,  
Jen misinformo tre surpriza:

Septembro – *sep*, sepa numero.  
Kaj naŭ estas ja malvero!  
Oktobro – *okto!* Vi komprenas!  
Ĉu tio vin plu ne ĉagrenas?  
Novembro kaj *Decembro*, respektive  
Sonas absurde, false kaj naive.

Ĉu tio estis ŝerca ŝanĝo  
De kronikistoj-romianoj?

Aŭ la ordono por aranĝo  
De la potenc-eklezianoj?

Neniu scias, kiu prenis,  
Ĉu grekoj aŭ la olda Sparto.  
Novjaron *iam* ni solenis  
Tutmonde en komenc' de Marto!

Laŭ hipotez' astronomia,  
Ni estas Ter-alvenantaro.  
Kaj praantikva kalendaro  
Atestas nun pri fakto tia.

Malgraŭ io, hej, homaro!  
Estu feliĉaj en Novjaro!

—Leonido Turkido, en Florido kun Mokrido



**Leonid TURKADZE**

Leonid estas radioamatoro kaj impone verkabunda poeto. Li loĝas en Davenport, Florido.

[n3gd@mail.ru](mailto:n3gd@mail.ru)

## Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

**Kontaktu nin:** <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CMC #271205, University of Rochester  
500 Joseph C. Wilson Blvd.  
Rochester NY 14627-1205  
United States of America

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retroŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eu>>. Ni petas, ke oni tamen atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimataj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



*Usona Esperantisto* (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer's name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.